

## Ne estu koko, venu al KKPS!

Proksimiĝas rapide la aŭtuno, kaj kelkaj el vi ja dezirus transsalti la tutan someron. Ĉar tiam okazos Klaĉ-Kunveno Post-Somera (jam la sesa), de la 27-a ĝis la 29-a de oktobro 2017, en Lunteren, Nederlando.



Lunteren estas la urbo en Nederlando kun plej multaj kokoj. Krome ĝi havas grandan junulargastejon, kun luksaj kaj modaj amasloĝejoj. La loko estas kompreneble facile atingebla per publika transporto....


La reta aliĝilo malfermiĝos je dimanĉo la 16-a de aprilo 2017 je 0:00 laŭ Lunteren-horo en [kkps.esperanto-jongeren.nl](http://kkps.esperanto-jongeren.nl)

### Provizora kotiztabelo:

	Benelukso	Okc. Eŭropo	Resto
30+	€65	€55	€50
20-29	€55	€50	€45
4-19	€45	€40	€35
3-		€10	

Membroj de TEJO aŭ NEJ pagas €10 malpli, aliĝoj post julio pagos €5 pli.

Malmultekostaj trajngrupbiletoj haveblas. Minimuma antaŭpaĝo €15.



# Pos-Amiko

Printempo 2017, Numero 20

*Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. TEJO-kondomoj ne plu senpagaj?
1. Ĵenga-turotago malsukcesa
2. Elekta komisiono timas Rusan influon
2. Sekva IJF okazos en flughaveno
2. TEJO-estraro eksigas komitatanojn pro nekonsentemo
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj

## 4. EVENTOJ **KOLOFONO**

Pos-Amiko estas eldonaĵo de

NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

http://kkps.esperanto-

jongeren.nl/Pos-Amiko

## TEJO-kondomoj ne plu senpagaj?

En decembro TEJO lanĉis monkoloktan kampanjon por kunfinanci la IJK-on en Afriko kaj vojaĝigi aktivulojn al Togolando. La kampanjo sukcesis kolekti duonon de la celita sumo. Ĉar TEJO ne volas bedaŭrigi parton el la tre valoraj partoprenontoj, TEJO promesas almenaŭ pagi ilian alvenon. Por ankoraŭ povi reveni, la asocio nun planas novajn enspezajn fontojn.

La plej furora produkto de TEJO, la kondomoj, ne plu estos disdonataj senpage sed kontraŭ tri steloj. Krome la ĝenerala sekretario preparolas kun la Centra Oficejo pri ebleco vendi la personajn datumojn de TEJO-membroj. Anonima membro proponis kapti idistojn kaj vendi iliajn renojn, sed ambaŭ estas jam tro maljunaj. Kaj por ŝpari monon pri la loĝigo de volontuloj, TEJO aktive instigas ilin amikiĝi, enamiĝi kaj ekkunloĝi kun lokuloj.

Se tamen la monkoloktado ne sufiĉos, almenaŭ la movado en Togolando signife kreskos baldaŭ.

## Ĵenga-turotago malsukcesa

Skandalo en ĵus okazinta aktivaĵo de NEJ: en la fino de marto la junulara organizo provis krei altajn turojn, sed pro vasta korupto tio fiaskis. Evidentiĝis, ke membroj ŝtelis konstrumaterialojn el jam finitaj etaĝoj anstataŭ liveri novajn. La neevitebla kolapso postulis ses mortintojn. Tiu postulo tamen estis ignorita.

## **Elekta komisiono timas Rusan influon en voĉdonado**

Membro de la elekta komisiono anonime kontaktis la Pos-Amikon kun la konstato, ke ili timas manipulon de la okazonta voĉdonado fare de Rusaj sekretaj agentoj. En diversaj landoj pasintjare aperis akuzoj de Rusa influo en la voĉdona procezo.

Unu el la iloj por manipulado estas la aperigo de falsaj novaĵoj celitaj al voĉdonrajtantaj komitatanoj. Kelkfoje povas esti malfacile distingi tiajn mensogojn de la veraĵojn en pres-tiĝaj gazetoj kiel Pos-Amiko, Livera Folio kaj Esperanto.wtf.

La fonto de tiu ĉi artikolo, A.R., komentas pri la afero:

“Nu, estas tiel, ke iuj fontoj indikas, ke la Rusoj speciale interesiĝas pri nia elekto de nova estraro. Neniam ni povas esti tro singardemaj pri tio, efektive. Imagu kio okazus, se iu Rusa agento elektiĝus Ĝenerala Sekretario de TEJO!”

Komitatanoj mem estas tro okupitaj pri trovi anstataŭanton, kiu iros al Togolando, por komenti pri la afero.

## **Sekva IJF okazos en flughaveno**

Kvankam la organiza teamo de IJF varbis pri ĝia proksimeco al flughaveno, kelkaj plendoj restis pri la busvojaĝo inter Bergamo kaj Castione. Evidentiĝas, ke ne-Italaj preferas pasigi laŭeble malmultan tempon en Itala publika transporto. Pro tio IEJ konsideras por la sekva jaro okazigi la IJF-on en la halo de flughaveno.

Estos kelkaj avantaĝoj en tio. La vojaĝtempo malkreskos, estos bunta oferto de rapid-manĝaĵoj, kaj Esperanto estos dum la semajno tre videbla por internacia publiko. La estraro de IEJ esperas en tiu ĉi monato anonci, kiu flughaveno estos la gastiganto de la 42-a IJF.

## **TEJO-estraro eksigas komitatanojn pro nekonsentemo**

Post la serio de kvereloj en la retlisto de la komitato de TEJO novembre (vidu la antaŭan Pos-Amikon) la TEJO-estraro en sia granda saĝeco kreis novan regulon por revenigi la harmonion al la komitato. Por instigi pozitivecon kaj kunlaboremon tiuj komitatanoj, kiuj en tri sinsekvaj voĉdonoj ne respondas aprobe, estos konsiderataj demisiintaj kaj perdos sian voĉdonrajton.

# NEJ-Novaĵoj!

## NEJ-bilardtago ne maltrafis celon

Je sabato la 18-a de februaro okazis la unua NEJ-tago de la nova jaro, en poŝbilardejo en la centro de Utrecht. Dek du homoj alvenis al la tago, ekzakte tiom, kiom da lokoj estis rezervitaj. La grupo dividiĝis al triopaj teamoj, kaj Utreĥta teamo evidentiĝis la plej sukcesa. La pilkoludo mem daŭris nur du horojn, sed antaŭe kaj poste estis bona etoso kun novaj kaj malnovaj membroj.

Malgranda grupo poste vojaĝis al Roterdamo por ĉeesti feston de la TEJO-volontuloj en Roterdamo. Unu el la ĉeestantoj de la festo poste membriĝis en NEJ!

## LA HOROSKOPO

**Ŝafo:** Vi estos minacata de tridek tri bovinoj.

**Taŭro:** Vi malkovros, ke ekskurso pli bonas ol kurso.

**Ĝemeloj:** Lasu spacon por la desertoj.

**Kankro:** Vi estos kontaktita de ĉarma Rusa sekreta agento.

**Leono:** Nenio certas en via vivo, krom la Pos-Amiko.

**Virgulino:** Post komitatkunsido vi ne plu estos

**Pesilo:** Tomata saŭco falos sur via Pos-Amiko kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Provu negoci grupan rabaton pri TEJO-kondomoj.

**Kévin M.:** Vi provos varbi idistojn por FESTO.

**Sagitario:** Sekvu la sagaron.

**Kaprikorno:** Vi gvidos ekskurson al manĝejo.

**Akvisto:** Vi sekvos ĉiujn trejnadojn samtempe.

**Fiŝoj:** Via kromnomo iĝos via oficiala nomo.

## Altaj atingoj dum NEJ-turotago

La marta NEJ-tago iris al nekutimaj lokoj: oficejoj kaj kunsidejoj en la plej altaj turoj de Amsterdamo. Dum unu tago en la jaro kelkaj altaj konstruaĵoj tie malfermas siajn pordojn al la publiko. Tiu publiko inkluzivis 13 Esperantistojn, kiuj krom la belaj vidoj ankaŭ ĝuis la senpagajn manĝaĵojn preparitajn de bankoj kaj asekurantoj.

Post la grimrado de altaj bankaj turoj venis spontanea ĉiĉeronado tra la centro de Amsterdamo, kiu finiĝis en malnova turo de borsejo. Unu estrarano rimarkis, ke li “tre ŝatas rigardi suben al Amsterdamanoj, kaj ne inverse”.

La sekva NEJ-tago okazos je la 23-a de aprilo en la florkampoj ĉirkaŭ Sassenheim.